

Ludwig Lazarus Zamenhof,

## Nia lingvo

Nia lingvo Esperanto  
super ĉio en la mond'!  
Ho kreskadu la anaro  
de pacema granda rond'.  
Kaj fermiĝu, per kompreno  
de malpaco, ĉefa front':  
Nia lingvo Esperanto  
super ĉio en la mond'.

Ni ne perdu la kuraĝon,  
alta estas nia cel'.  
Nur antaŭen! Nia stelo  
alte brilas en ĉiel'!  
Por la lingvo Esperanto  
disvastiĝos granda hel':  
Ni ne perdu la kuraĝon,  
alta estas nia cel'.

Nia lingvo Esperanto  
super ĉio en la mond'!  
Ĝis popoloj pli liberaj  
sin komprenos en la mond':  
Ni laboru ne laciĝe  
por la venko en estont'!  
Nia lingvo Esperanto  
super ĉio en la mond'.

...

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-352-698 (2006-03-14 17:57:51)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi kanto-tekston en la libreto “Esperanto-Sangbogen”, eldonita en 1941 de “Dansk Arbejder Esperanto Forbund” (= Dans Laborista Esperanto-Ligo) kaj “Dansk Esperanto Selskab” (“Dana Esperanto Asocio)”. Kiel verkinto estas indikita tie: L. L. Zamenhof. Mi ricevis la libreton en 2006-02-15 de s-ro Lars Kromann Jensen (Stenbrydervej 6, DK-4640 Fakse, Danio). Indikita estas super la teksto, ke ghi estu kantata laŭ la melodio de la germana nacia himno (Deutschland, Deutschland über alles). - La verkinto tre verŝajne ne estas Zamenhof, laŭ informo de s-ro Christian Zimpa (Esperanto Muzeo Vieno).*